# EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:38; oktobro 18.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: sen. Sume 390 KB

## Kurso por hispanlingvanoj

Ekde 2020 UEA kaj Kolombia Esperanto-Ligo (KEL) kunlaboras por ĉiujare okazigi retajn Esperanto-kursojn por hispanparolantoj. En kelkaj jaroj ili partneras kun TEJO kaj aliaj landaj asocioj de UEA, kiel Hispana Esperanto-Federacio kaj Meksika Esperanto-Federacio, krom aliaj grupoj. Tiu agado okazas kadre de la Amerika Komisiono de UEA ĉefe kiel informa agado, kiu kontribuas ankaŭ al la instrua, reta kaj varba agadoj.

Al tiu agado entute ĝis nun aliĝis pli ol 2000 lernaintoj el 29 landoj en la lastaj jaroj. La kursoj estas senpagaj kaj celas kaj komencantojn kaj progresantojn. Ĉiu lernanto havas aliron al vasta materialo, parolsesioj, lerniloj kaj virtualaj lecionoj gvidataj de spertaj esperantistoj, kiuj instruas la bazojn de la lingvo, krom prononcado, historio kaj panoramo de la Eo-movado kaj aliaj temoj. En 2024 la kurso, al kiu jam aliĝis pli ol 300 lernontoj, okazos ĝis la 23-a de novembro, tiel ke ĉiuj lernintoj povos post la kurso sperti Esperantujon per partopreno en la 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto, ekiĝonta la 28-an de novembro: https://vk.esperanto.net.

La kurson oni trovas per la ligilo https://cursos.esperanto.co, kun demandoj kaj respondoj, krome kun detalaj kalendaro kaj enhavo.

Ĉiujare la enhavo de la kurso pliboniĝas kaj la instrumetodoj evoluas. Jam en 2020, okaze de la Tago de Ameriko (https://youtu.be/IAeaTnP1tFM), kelkaj el la lernintoj povis post la kurso plensukcese prelegi, tute flue. Similaj fluaj paroladoj ankaŭ estis en 2021, okaze de la fermo de la 2-a eldono de la Esperanto-kurso por hispanparolantoj: de tiam la kurso ĉiam finiĝas per oficiala fermo, kiu enhavas kaj prelegojn de lernintoj kaj invitojn de Eo-organizoj al ekaktivado en nia komunumo.

Ĉar la kurso estas senpaga por aliĝantoj kaj UEA simbole kompensas instruistojn kaj organizantojn. Se vi volas kaj povas helpi, via amika donaco bonvenas al la Fondaĵo Ameriko de UEA (https://uea.org/alighoj/donacoj/ameriko).

## La Novjara Renkontiĝo denove en Germanio

La dudekunua Novjara Renkontiĝo (NR) kaj 14-a Novjara Internacia Semajno okazos de la 27-a de decembro 2024 ĝis la tria de januaro 2025, denove en Wiesbaden ĉe Rejno, 40 km okcidente de Frankfurto/Majno, en la junulargastejo, en kiu ni jam plurfoje renkontiĝis.

Informa paĝo http://esperanto.land/nr/#nr
Aliĝilo http://esperanto.land/nr/alighilo.shtml#alighilo
Unuaj aliĝintoj http://esperanto.land/nr/partoprenantoj_nr21.php

## Nov-Zelandanoj kaj Aŭstralianoj kune – ja, nu, are

Nia somerkursaro kaj kongreso okazos en januaro 2025 de la 5-a ĝis la 11-a en Aŭstralio. La du instruistoj estos Trevor Steele kaj Hoan Tran.

Helen Palmer, Aŭstralio

## Interlingvistoj festas kaj arkonas

Okazis la lasta interlingvistika sesio kun ekzamenoj kaj bankedo. Sekvis ĝin la Interlingvistika laborsekcio de la Internacia Lingvista Kongreso kaj Arkones kun riĉa programo, vidu: https://edukado.net/novajhoj?id=910

Aperis por tiu evento la Elektitaj Artikoloj de Istvan Szerdahelyi kaj antaŭe por la fino de la magistraj studoj pri interlingvistiko ankaŭ du temvortaretoj en ĉina versio: https://edukado.net/biblioteko/libroj?iid=23523

Prof. d-ro hab. Ilona Koutny, Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj kaj Hungarologia Katedro
Universitato Adam Mickiewicz, Poznano

## Arkones – pluviviginda!

Meze de septembro 2024 en Poznano okazis la 38-a Arkones (Artaj Konfrontoj en Esperanto), kiu laŭdire estis la lasta. Legu prian artikolon de Russ Williams (kun fotoj de Ulrich Matthias) en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2024/09/polujo-27/

https://interl.amu.edu.pl/interlingvistiko/magistraj_raporto_jun24.html

Prelego pri Szerdahelyi: https://www.youtube.com/watch?v=vuqwtu8Nss0

Interlingvistika laborsesio kadre de la Internacia Lingvista kongreso en 2024:https://icl2024poznan.pl/?id=10; https://linguistlist.org/issues/34.3308/

Prelego pri universitataj studoj pri interlingvistiko k interkultura komunikado: https://magentacloud.de/s/HFwSRxkcFixx2Sp?path=%2FIlona%20Koutny

Libroj: https://interl.amu.edu.pl/interlingvistiko/ k https://wydawnictworys.com/

## La itala kongreso en la memoro

En la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* aperis artikolo de Ulrich Matthias pri la 90-a Itala Kongreso de Esperanto, kiu okazis aŭguste en Montecatini Terme kun ducento da partoprenantoj. Legu ĝin ĉe https://sezonoj.ru/2024/09/italujo-6/

Samloke aperis artikolo de la Moskva Esperanto-aktivulo Roman Raljko pri la 80-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Šventoji (Litovio) kaj pri la aventurplena vojaĝo tien kaj reen. La artikolon garnas pluraj fotoj. Legu ĝin ĉe https://sezonoj.ru/2024/09/litovio-76/

## Universitataj evoluoj en Ĉinio

La universitato Xi'an Jiaotong estas mondfama kiel teknologia altlernejo. Iam aktivis esperantistoj, kiuj jam pli longe translokiĝis al Usono. Fakte, ĝia malpostulo de la angla ekzameno okazis nekaŭze de politiko, sed de merkato. Lastajn jarojn multe da ĉinaj altlernejoj jam ne povas trovi novajn studentojn por la angla fako. Pro tio iuj Universitatoj malfondis sian anglan fakon. La merkato kiel senvidebla forto manipulas altlernejan konduton je sia lingva politiko. Multaj altlernejoj grandigis sian kampuson, sed nun mankas novaj studentoj. Ili ne volas limigi eniron de novaj studentoj kaŭze de la angla lingvo, jam malmoda en Ĉinio.

Artikolo por Ĉina Radio Internacia temas pri la eldono de la Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2022-23 kaj aliaj planitaj agadoj por celebri la 75-jariĝon de ILEI

Alessandra Madella

## Stelo brilas en Kongo DR

Jen la dua numero de Konga Stelo. En ĝi vi legos pri kongolandanoj en la UK, Nova Sento, Vojaĝo Eŭropen, korespondpetojn kaj svahila leciono. https://uea.org/vikio/Dosiero:Konga_stelo_2..pdf

Joel Muhire, Kongo DR

## Litova dutaga festado

Ekde la 21-a de septembro 2024 en Antalkiai okazis aŭtuna kunflugo de Litovaj esperantistoj kun partopreno de kelkaj famuloj, inkluzive de **Vytenis Andriukaitis** – membro de la Eŭropa Parlamento, honora prezidanto de Litovia Socialdemokrata Partio, eksministro, eksa membro de la Eŭropa Komisiono, membro de Honora Patrona Komitato de UEA. Legu prian artikolon de Povilas Jegorovas en *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2024/10/litovio-77/

========= vortoj: 835 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)




La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**La unuaj tridek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn, kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.